Esperanto Societo Frankfurto

Marto 2024

# Esperanto-Informilo

Rubrikoj ĉi-numere:


- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo



**Kolofono:**
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto:

Foto: Migrado sur la trajnreloj inter Dillenburg kaj Frohnhausen la 25-an de februaro `24, https://maps.app.goo.gl/ZLuqUXn76z7u5hDG9

Mezaĝo de la prezidanto:

La februaro komencis tre malseka, almenaŭ ĉi-tie en Hesio. La antaŭ-alp-regiono profitas de sunecaj tagoj pro la ofta varmventfenomeno (germane: Föhn-Wind) kaj estas tute komprenebla ke multaj homoj ŝatas iri tien por nun ferii. Sed ankaŭ en nia regiono la vetero nun paŝo post paŝo pliboniĝas kaj permesas al ni iri eksteren por ĝardenlaboro, migradi, kuradi aŭ bicikladi. Ne forgesu enŝalti viajn mem-mezurilojn, mi pritraktis tiun temon en la eseo „La akcelado kaj la primezurita vivo“.

Mi deziras al vi bonan legadon,

Georg Hennemann, 3.3.2024


**Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.**
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender:
Georg Hennemann
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614


**Bankverbindung:**
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

**Jahresbeitrag**
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

# Programo

**“Unua mardo”**
la 5-an de marto 24
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo
Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

**“Tria mardo”**

surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt

| | | |
|---|---|---|
| Dienstag, den 19. marto, 24 | | Mardon, la 19-an de marto, 24 |
| 18:30 h | Sprachrunde | Babila Rondo |
| 19:30 h | Vortrag | Prelego |

" *La Alpoj en la pentroarto*"

"Die Alpen in der Malerei”

G. Schäfer

**“Kvara mardo“**
la 26-an de marto, 24
ekde la 19h horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt/Main

# El la klubo

## Anoncoj:

| | |
|---|---|
| 16.4.24 | Membrokunveno la trian mardon de aprilo |
| 25.5.24 | Propono: Somerfesto je G. Schäfer en Stierstadt |
| 29.6.24 | Propono: Ekskurso al „Vulkanurbo“ Gedern en Vogelsberg-Distrikto |
| 07.09.24 | Propono: Migrado kun jubilea evento en naturamika dometo aŭ Kradrokabano |

| | |
|---|---|
| 5.8. – 15.8.24 | Someraj ferioj de Saalbau-MÜZ |

## Eventoj en la Rejn-Mejn-Regiono:

| | |
|---|---|
| 15.04.24 – 19.04.24 | *Esperanto-Semajno en VHS Sonnemannstraße, Frankfurt de Martin Ptasinski, pliaj informoj:* https://vhs.frankfurt.de/de/portal#/search/detail/167920 |

# Pri akcelado kaj la primezurita vivo

Opinia eseo de G. Hennemann

Ĉu en germanujo vi havas »plirapidigismon«? Tiu estis demando en la telegramgrupo "Esperanto-Deutsch" de uzanto Alexandre François Garreau "<galex-713@galex-713.eu>" @galex713 galeks ' (ni/nia/nin) fr it eo la 20-an februaron 2024.

Mi pensas ke tiu estas interesa demando kaj plifunde informante sin oni trovas ke ekzistas almenaŭ tri formoj da akcelado, kiuj cetere ne devus esti intermiksita aŭ konfuzita kun la filosofia kaj politika teorio pri plirapidigismo aŭ akcelismo: Tiu teorio kaj aliaj el ĝi evoluitaj politikaj movadoj indus pritrakti en alia eseo.
Do se temas pri akcelado oni diferenciĝas inter teĥnika, socia kaj vivoritma formo de akcelado. Unuopulo eble ‘suferas’ nur sub unu formo de akcelado, sed aliopuloj eble sub ĉiuj tri formoj – kiu scias?

La unua kaj plej evidenta formo estas la teĥnika akcelo: pliigi la rapidecon de celitaj transporto, komunikado kaj produktadaj procezoj. Ĉi tio inkluzivas ankaŭ novajn formojn de organizo kaj administrado, kiuj celas akceli procedurojn. Tiu formo de akcelado jam komencis kun la industria revolucio ekde la 18-a jarcento. La dua formo nomiĝas socia akcelado kaj oni sentas aŭ spertas ĝin kiel ŝrumpadon de la nuntempo: ĝi estas spertita kiel la mallongigo de la tempoperiodoj kiuj povas esti difinitaj kiel la nuntempo.
La tria formo estas la akcelado de la ritmo de socia vivo. Ĝi povas esti difinita kiel pliigo de la nombro de agoj aŭ spertoj po unuo de tempo kaj tiel estas rezulto de la deziro, pli fari en malpli da tempo. Tiun formon de akcelado ni ĉiuj ja certe konas kaj ni ĉiuj devis lerni ĝin iel-iom kontroligi. Kaj tiu tria formo de akcelado igis min skribi tiun eseon pri la temo "la primezurita vivo", do temas pri la akcelo de la ritmo de nia socia vivo kaj ĝiaj strangaj rezultoj. Paŝoj, migrado- aŭ kuradodistancoj, rapideco, spirado, sangopremo, pulso, dormo, pezo kaj kalorioj: Multaj homoj nun registras siajn korpajn datumojn kaj siajn sankondutojn helpe de teĥnikaj aŭ ciferecaj iloj. Ĉi tiu cifereca mem-mezurado aŭ mem-spurado celas konduki al pli sana vivo kaj finfine al pli da memscio. Sed memspurado ankaŭ povas havi senkonsciajn psikologiajn funkciojn, kiel studo montris. "Esence temas pri kontrolado de internaj senkonsciaj procezoj, kiuj efektive eskapas kontrolon," diras Prof. Benigna Gerisch el la Internacia Psikanalitika Universitato (IPU) Berlino kaj unu el tri projektestroj de la studo "La Mezurita Vivo". Do, ĉu ĉi tiu memkontrolado estas nura signo de malsekureco pri nia “homana kondiĉo” kaj provo eskapi el la nuntempo - aŭ eble nur ilo de distrado kaj memkontentiĝo? Kiel dirite: Tiuj iloj nur surface donas al iliaj uzantoj pli da memscio. La individuo restas en sia maltrankvila stato kaj la superuzado de tiuj iloj povas eĉ pliigi streĉon kaj nervozecon. Ne mencii la supergvatadon kaj kontrolon kion tiuj elektronikaj ilo ĉiam rete konektite nun ofertas al kompanioj kaj la ŝtatoj. La “kuraĝa nova mondo” (angle: Brave new world) de Aldous Huksley jam salutas. Sed kiel oni povas helpi personon kiuj suferas sub tiuj simtomoj de maltrankvileco, malsekureco pro la akcelo de la ritmo de nia socia vivo? Ĉu ili nur vizitu psikologon kiu ordonas rezigni troan memmezuradon? Se estus tiel facile! Sen profunda kompreno pri nia memo kaj nia homa kondiĉo tiuj ‘ordonoj sen kompreno’ ne garantias resaniĝon. Nur profunda memkompreno helpas reen gajni memsekurecon kaj novan vivkvaliton.

Kiel vi pensas pri tiu nuntempa modo de mem-mezurado kaj kiujn mezurilojn vi mem uzas regule, profesie aŭ ŝatokupe, dum la labortago, semajnfino aŭ eĉ dum viaj ferioj?

PS: Vidu ankaŭ mian simile tematitan eseon pri „La Homaranismo de Zamenhof en ĝia hodiaŭa percepto kaj pritaksado“ en la marta eldono 2023, https://esperanto-frankfurt.de/wp-content/uploads/2023/02/EI_marto_03.pdf

Iuj ligiloj:
https://www.researchgate.net/publication/325545090_Wie_entrinnen_Beschleunigung_Wachstum_und_das_Leiden_unter_Optimierungsdruck
https://idw-online.de/de/news776586
https://de.wikipedia.org/wiki/Akzelerationismus
https://www.deutschlandfunk.de/philosophie-das-akzelerationistische-manifest-100.html

# Rakonto

La ŝtona gasto (de Felmano Ulriko)

Iam ĝi estis sur la tablo. Aŭ ĉu mi diru... li? Eta, eble tri centimetrojn alta, sidanta budao, el malhelblua, brile glata sapŝtono.

Ĝi estis en unu de miaj kestoj entenantaj skribtabulajn aĵojn kaj ilojn. Ĉar mi dumvive ofte translokiĝintis - mi vivis en dekok loĝejoj en dek urboj en kvar landoj - mi kolektis multajn de tiaĵoj en pluraj kestoj. Foje mi post la translokiĝo elpakis nur parton de la antaŭaj kestoj, foje mi aĉetis tute novan ilaron ĉar mi ne povis ekspedi miajn havaĵojn al la nova loko, sed stokis ilin en iu tenejo ĉe la gepatroj, parencoj, aŭ amikoj.

Sekve de tiuj multaj translokiĝoj, mi iam posedis tri biciklojn, kvin ŝaktabulojn, dek dorsosakojn, centojn da libroj, kaj amason da pakaĵoj, kartonaĵoj, kestoj k.a. ujoj, enhavantaj sennombran kvanton da skribiloj, pingloj, agrafoj, glustrioj, inkujoj, ornamaj figuretoj, glasoj kun inskriboj kiel ekz-e "Dienheim am Rhein 1978", modelaŭtoj, fotoj, bildkartoj, kaj aliaj etaĵoj, lignaj, plastaj aŭ ŝtonaj, i.a. lignan verdan ranon de mia fratino, plastan krokodileton kiu povis fermi-malfermi sian faŭkon, kaj - tiun budaon.

Iam mi ne plu sciis, kion mi havis, kaj post translokiĝoj, kiuj ebligis reuzi iujn de la iam enstokitaj aferoj, mi dum elpakado surpriziĝis pri la trovitaĵoj. "Ho, tion mi havis! Ho, bele! Kio estas tio? Ĉu mi forigu? Por kio oni uzu tion? Tion donacis al mi Mariino! Ho, kiom malgranda!"
Sed damne, de kie mi havas tiun ŝtonan budaon? Ĉu iu donacis ĝin al mi aŭ ĉu mi ĝin aĉetis? Ĉu mi ekhavis ĝin dum mia tempo en Barato, aŭ ĉu iu stratvendisto en Italujo metis ĝin en mian manon kaj poste postulis monon por ĝi? Mi ne plu scias. Sed tiu ŝtona gasto foje dum pluraj jaroj estis kun mi, sidante sur la tablo, ofte sub la ekrano de mia hejma komputilo, kaj ni observis nin reciproke, li min pli ofte ol inverse, mi supozas. Kaj foje mi prenis ĝin en la manon por sperti la formon, senti la ŝtonan malvarmon, malmolon, kaj surfacan strukturon. Kiu persono tiun figuraĵon kiam kiel produktis? Kiel ĝi trovis sian vojon ĝis mia tablo?

Eble mi neniam eltrovos, eble mia memoro tamen iam hazarde malkaŝos, mi vidu.

Post nia lasta, loĝejinterna "translokiĝo", kiu okazis antaŭ pli ol tri jaroj, kiam ni familie movis ĉiujn havaĵojn alisalonen, por novfarbi la vandojn kaj aliuzigi la ĉambrojn, la budao denove malaperintis. Ĝi sidas nun en iu de la multaj kestoj starantaj en iuj ŝrankoj, kaj meditas, kiel ĉiam. Iam ĝi verŝajne denove aperos, kaj mi prenos ĝin en la manon por sperti la formon, senti la ŝtonan malvarmon, malmolon, kaj la surfacan strukturon. Kaj mi metos ĝin sur mian labortablon, apud mia komputila ekrano.

# El la kluba historio

El la klublibro,  volumo de aprilo 1999 ĝis decembro 2002, mi scanis paĝon de la 29-a de februaro, 2000. Estis superjaro kaj ni havis supergrupon:




HARDON, LA 29-AN DE FEBRUARO 2000

Hodiaŭ estas la plej grava tago de superjaro, kaj mi havas ĉi tie supergrupon

Jean-Thiery von Büren el Neuchâtel (Svislando)
Kab. Ecurâdt
Denuis Wibrow Feb 5 I.

Hodiaŭ estas la kvare ohazo, ke mi ĉi tie venas. Mi povas certe plu bone komprani, ke la unue ohazo, sed mi scias ke mi multa esperanton lerni devas. B. Kaulin

Felmano Klisko (Kiu invitis du novicojn kiuj ne volis sijni)
Komplet. Izolano Cuculo

# Diversaĵoj

**Ŝercdemando** (trovita de  Georg):

D: Kiu limdato en marto estas grava por ŝtatoficistoj?

R: La 31-a de marto. Fino de vintrodormo - komenco de printempa laceco.

## **Proverbo de la monato** (de G. Hennemann)

La proverbo, kiujn mi hodiaŭ prezentas, temas pri kiel diferencigi bonajn profetojn de malbonajn.
La proverbo devenas el citaĵo en la biblio:

Temo:

[zam-255.01] Laŭ la frukto oni arbon ekkonas

Fonto: http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0256.htm

En la biblio ĉe Mateo 7, 15-20 oni trovas ankaŭ la citaĵon “Vi rekonos ilin (la profetojn) per iliaj fruktoj”

Kiel vi pensas pri la citaĵo el la biblio?
Ĉu oni ekkonas kaj taksas aliulojn pli bone laŭ iliaj vortoj aŭ laŭ iliaj verkoj?

Pliaj informoj en la reto pri la sama temo: https://faithalone.org/freie-gnade-im-brennpunkt/an-ihren-fruchten-sollt-ihr-sie-erkennen-matthaus-715-20/

## **Enigmo** (de Felmano Ulriko)

La solvo de la enigmo el la februara ei …. Neniu ĝis nun solvis aŭ jam respondis. Do, ankoraŭfoje estas ŝanco

**Enigmo nova** (de Felmano Ulriko):

La ĉi-tiama enigmo estas kvizo pri nia historio
Jen la demandoj:

(1) Kie okazis la unua internacia esperantokongreso, kiu estis la antaŭulo kaj naskoĝermo de la sekvajara oficiale unua kongreso en Bulonjo-sur-maro, kaj kiom de germanaj esperantistoj partoprenis en ĝi?

(2) Kiu fama franca esperantisto estis instruisto, komunisto, kunfondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kaj redaktoro de la revuoj "Sennaciulo" kaj "Sennacieca Revuo"?

(3) Kiu konata astronomo en la jaro 1612 kiel unua ekvidis kaj registris la planedon Neptuno, sed erare konsideris ĝin fiksa stelo? (La oficiala malkovro kiel planedo sekvis maljam 234 jarojn poste fare de la germana astronomo Johann Gottfried Galle je la 23-a de septembro 1846.)

(4) Kiu konata israela ĵurnalisto kaj mondkonata verkisto de 20 libroj, kiu estis ankaŭ lekciisto de literaturo en la Universitato Ben-Gurion de Negevo en Be'er Ŝeba, skribis hebrelingvan novelon nomita "Esperanto", (kuntradukita de Amri Wandel al Esperanto)?

La solvojn sendu al Felmano Ulriko, aŭ en la kluban Telegraman kanalon, aŭ poŝte, aŭ retpoŝte al:
ulrich.fellmann@gmx.de

# Antaŭlasta paĝo

Lingvolernado

Trovu la diferencojn inter la sekvaj kvar nuance diversaj esperantovortoj kaj ligu ilin al la germanlingvaj (aŭ anglalingvaj) vortoj, ekzemple per 1-CE, 2-AD, 3B ktp.

Esperanto:
1 redunda
2 superflua
3 nenecesa
4 senutila

Germanlingvaĵoj:
A überflüssig
B nutzlos
C unbrauchbar
D überzählig
E redundant
F unnötig
G unbrauchbar
H unnütz

Anglalingvaĵoj:
a futile
b superfluous
c pointless
d redundant
e unnecessary

*Mitgliederversammlung / Membrokunveno(1)*

**Einladung zur Mitgliederversammlung am 16.04.2024 im Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt**

Tagesordnung
Beginn: 19:00 Uhr
TOP 1: Begrüßung, Feststellung der Beschlussfähigkeit
TOP 2: Findung eines Protokollanten
TOP 3: Annahme der Tagesordnung
TOP 4: Genehmigung des Protokolls der letzten Mitgliederversammlung
TOP 5: Tätigkeitsbericht des Vorstandes
TOP 6: Finanzbericht des Rechnungsführers
TOP 7: Bericht der Kassenprüfer
TOP 8: Diskussion der Berichte
TOP 9: Entlastung des Vorstandes
TOP 10: Wahl der Wahlleitung
TOP 11: Wahl des Vorstands
TOP 12: Wahl neuer Kassenprüfer
TOP 13: Programmplanung

Anträge bitte bis zum 02.4.24 schriftlich oder per Email an estraro@esf-listeo.eu

(1) Ĉar la ESF estas registrita asocio ("e.V.") kun imposta avantaĝo, membrokunveno devas esti anoncata kaj protokolata en la germana lingvo.